

## Por pli bone kompreni nian movadon

*Lingvo kaj popolo. Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado.* Humphrey Tonkin.  
UEA, Rotterdam 2006. 159 paĝoj. 21cm. ISBN 929017093X. Prezo: € 14,10

Por la aŭtoro Humphrey Tonkin, kiu estas konsiderata kiel „la plej elstara gvidanto de la Esperanto-movado de la lastaj jardekoj“ (dorsa kovrilo), Esperanto signifas lingvan revolucion, sed la metodoj de la Esperanto-movado disvastigi tiun lingvon apenaŭ montriĝas revoluciaj. La artikoloj de la fama brita-usona esperantisto, publikigitaj en la libro *Lingvo kaj Popolo*, kiuj estas la skriba formo de prelegserio, kiu devintus okazi kadre de la postdiploma programo de Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando, mem ne celas esti revoluciaj, sed klarigaj, informaj kaj diskut-instigaj. Ĉiuj el la ok aparte legindaj ĉapitroj estas dediĉitaj al alia prioritata temo, kaj ĉiu ĉapitro starigas amason da konsideroj, asertoj, tezoj, demandoj kaj meditoj pri la pasinteco, aktuala periodo kaj estonteco de la Esperanto-movado, de UEA kaj de la esperantismo. La aŭtoro referencas al propraj kaj fremdaj artikoloj, kies bibliografion oni trovas fine de la volumeto.

Ĉar en la historio de la Esperanto-movado ĝiaj komunumanoj ofte debatis kaj kverelis pri la adekvataj organizaj formoj kaj ne certis, ĉu ili fondu organizaĵon aŭ prefere agu ekster ajna organiza kadro, Tonkin atentigas en la unua ĉapitro pri *La lingvo kaj ĝia rolo: idearo kaj ideologio*, ke necesas sin demandi pri la dezirinda identeco: ĉu do ni estas – aŭ estu – movado, lingvokomunumo, popolo aŭ civito, diasporo aŭ ĉu (novtipa) kulturo? Do la esperantistan socion oni povas koncepti laŭ diversaj manieroj, depende de la valoroj atribuitaj al ĝi, kaj oni povas vidi ĝin tra pli ol unu prismo. La motivoj por esperantisteco povas tre varii, same la karaktero de la Esperanto-movado en la plej diversaj landoj.

La konkludo, ke ju pli efika Esperanto fariĝas, des malpli urĝa estas la bezono disvastigi ĝin, certe estas paradoksa kaj malagrabra vero por la esperantistaro, kiun necesas digesti kaj al kiu oni devas adekvate reagi: Ne per unuiĝo en negativa opinio rilate la lingvan problemon en la mondo kaj la eksteran publikon, ĉar la ĉirkaŭanta ekstera socio tiel malestime konsideras nian lingvoprojekton, sed per pozitiva aliro al tiu lingva realeco, eĉ se la usonangla lingvo dominas. En la dua ĉapitro pri *Lingva politiko interna kaj ekstera* Tonkin lamentas pri la malkapablo de la Esperanto-movado kongruigi la du sferojn de la interna kaj ekstera politiko.

En la tria, teoria ĉapitro pri *Kio estas lingvopolitiko?* Tonkin atentigas, ke lingvoplanado ne estas afero nur de registaroj, sed ankaŭ de neregistaraj organizaĵoj. Sekve UEA okupu

la adekvatan lokon en tiu diskutado, kondiĉe ke la diversaj difinoj kaj aspektoj de lingvopolitiko kaj lingvoplanado estas korekte aplikataj al Esperanto.

Granda parto de la teksto koncernas la rolon, taskojn kaj problemojn de Universala Esperanto-Asocio, la pinta rolulo de la Esperanto-movado. Por rompi sian izolecon, Tonkin rekomendas al UEA alianciĝi kun tiuj, kiuj almenaŭ komprenas la gravecon de la lingva dimensio en internaciaj rilatoj. La kvara ĉapitro emfazas la gravecon de *Lingvokultivado* kaj atribuas al UEA, kiu sendube estas konservenda, sed ankaŭ reformenda kaj modernigenda, en tio amason da gravaj taskoj. Koncerne la neŭtralecon de UEA, Tonkin apartenas al tiuj, kiuj favoras aliancojn kun samtipaj aŭ similcelaj organizaĵoj, eĉ se ili estas neneŭtralaj kiel ekzemple komunistaj. Lapenna, kiu daŭre estas traktata en la libro, evidente devis resti por Tonkin speco de koŝmaro, de kiu li ŝajne malfacile liberiĝas, ĉar la travivitaj krizoj kun li devis profunde impresi la tiaman junulon, en kiu iuj mem kredis malkovri la novan Lapennan. Kiel gravega influanto rilate la lingvouzon de ĝiaj membroj, parolan kaj skriban, UEA do neniel neglektu la lingvan nivelon de la membroj, sed male, altigu ĝin, mem uzu la lingvon modele kaj krome ankaŭ okupiĝu pri la kultura dimensio de la lingvo. Se Tonkin kritikis ankaŭ la neadekvatan plenumadon de la prizorgado kaj stimulado de



la libro-kulturo en Esperanto, li trafas alian vundan punkton de la Esperanto-movado.

Kiom grandan signifon havas por Tonkin la *Eksteraj rilatoj kun UN kaj Unesko*, eblas konstati en la kvina ĉapitro. La ĉefa celo de la ekstera agado estas gajni statuson kaj influon por Esperanto. Eksteraj rilatoj estas delikata tereno kaj dependas de multaj faktoroj kaj kapricoj ofte malfacile antaŭvideblaj. Same la sukceso de eksteraj rilatoj dependas ne nur de formala diplomatio, sed ankaŭ de personaj amikecoj kun gravaj funkciuloj, kiuj simpatias al la afero de Esperanto.

En la sesa ĉapitro pri *Nunaj kaj estontaj strukturoj* Tonkin montras sin konvinkita, ke la falo de la komunismo, la enkonduko de la kapitalismo en Orienta Eŭropo kaj la interreto profunde ŝanĝis la mondon kaj postlasis spurojn ankaŭ en UEA. Antaŭ ol enkonduki iujn ajn strukturajn reformojn sur la ebena de la Komitato, Estraro kaj oficistaro, estas neeviteble, ke UEA unue okupiĝu pri siaj financoj, kaj ankaŭ pri sia Strategia Plano. Krome necesus eviti la rivalecon inter la Centra Oficejo kaj la Estraro kaj klare

distingi la rolon kaj taskojn de ambaŭ instancoj. La Estraro ludu sole superrigardan rolon, la Centra Oficejo ricevu la okazon por garantii, krom la administraj, aldonajn servojn sur la eduka kaj kultura kampoj, nelaste favore al la Landaj Asocioj. La malnova konstruaĵo de 1887 en Roterdamo devus esti renovigita\*. La Universalan Kongreson oni ne devas malmunti, sed tamen reekzameni ĝiajn celojn por plenumi tiujn celojn pli bone. Antaŭ ĉio necesus eviti, ke la UK-publiko restu pasivaj konsumantoj, ke la kultura kaj kleriga dimensioj estu pli efike flegataj kaj ke la individuaj kotizoj estu reduktitaj. (\* *La renovigoj jam komenciĝis, rim. de la redaktoro.*)

Pri la ĉefaj trajtoj de *La Esperanto-komunumo en la mondo* oni povas legi en ĉapitro 7. La tiklan demandon de la esperantista identeco traktas la fina, oka ĉapitro *Esploroj kaj estonteco*. Laŭ Tonkin, kaj aliaj, ne tio estas konvinka, ĉu Esperanto havas aŭ ne havas akuzativon, sed ĉu ĝi havas estontecon. Kiu do deziras konatiĝi ne nur kun la pensado de unu el la plej elstaraj, spertaj kaj kleraj movadaj aktivuloj, sed ankaŭ por pli bone kompreni bazajn debatojn, diagnozojn, analizojn kaj interpretojn pri la Esperanto-movado, kiel ĝi aperigas sin dum jardekoj kaj nuntempe, nepre legu tiun libron.

**Andreas Künzli**

## Kulisa retrospektivo pri la lingvo kaj movado

*Pri nia pvz-ado 1959–2004. Ludovikito kaj liaj kamaradoj.* Kyoto: Ludovikito, 2004. 258+26p. 21cm. Kun kolora kromkovrilo. Prezo: € 16,50

**K**iam, kvazaŭ etrecenze pri la 57 volumoj, Ulrich Lins artikolis en la revuo *Esperanto* pasintaprila pri la “finfine kompletigita plena verkaro de I.L. Zamenhof” eldone de Itō Kanzi, pli bone konata kiel Ludovikito, li probable ne sciis, ke ankoraŭ mankas la perlo, kiu fermas la aŭreolon de Ludovikito al Ludoviko (Zamenhof). Ja “*pri nia pvz-ado / 1959-2004 / ludovikito kaj liaj kamaradoj*” aperis poste. Ĝi estas la verkista piroteknikaĵo de pasia admiranto pri la penso, personeco kaj la lingvo de la iniciatinto de Esperanto, kiu interalie devis barakti meze de “bataloj de kraboj en la profundo de oceanoj”. Tiel nomis Ludovikito la senkompatajn konfliktojn inter esperantistoj kaj reformemajn krizojn de la lingvo.

Eksterseria volumo ĝi estas: “al ĉiuj koramikoj, kiuj spirite kaj korpe bonvolis helpadi lin, kaj fosilitrovade kaj monrimede subtenadis lian idiotan entreprenon, kun elkoraj dankoj kaj bondeziroj dediĉas tiun ĉi humilan memorajeton tute kadukiĝinta 86-jara ermitaĉo”.



Fakte temas ne nur pri historio de la tuta eldono, sed ankaŭ pri aŭtobiografio de tiu mecenato al kiu ni ŝuldas la komentitan savon, ne malofte faksimile, kaj diskonigon de lingve modelaj zamenhofaĵoj malgraŭ arkaismoj, kiuj demonstras, ke Esperanto estas vivanta lingvo.

La desegnaĵoj kaj buntaj kovrilpaĝoj estas de „m. fruscieva”. La teksto konsistas el 117 ĉapitroj kaj ĉiu ĉapitro estas, senescepte, dupaĝa, kio, en si mem, estas lertaĵo neordinara. La stilo estas tipe ludovikita, bone konata de tiuj kiuj ĝuis liajn postparolojn laŭlonge de la eldonoj.

Kiel ĉiam la presado estas altkvalita eĉ se iuj povas esti ĝenataj pro la uzo de nur minusklaj literoj.

Je la fino de la libro kronologia tabelo de la eldonaĵoj de Ludovikito, resendo al la diversaj volumoj por trovi la inkunablojn kaj indekso de la nomoj estas tre utilaj.

Kiu havas intereson pri la historio de la lingvo kaj de la movado tutcerte aprezos tiun kulisan retrospektivon de la havindaj eldonoj de Ludovikito.

**Jean Amouroux**

## Leginda kaj ludinda

*Onklo Vanja.* Anton P. Ĉeĥov. Trad. M. Povorin. Moskvo, 2005. 44 p. 21cm. Prezo: € 3,00

**L**a subtitolo („Scenoj el vilaĝa vivo en kvar aktoj”) pensigus pri drameto; ankaŭ la modesta kajero (literatura suplemento al la gazeto REGo) kaj la absoluta manko de informoj pri ĝia aŭtoro. Temas pri la mondfama rusa verkisto Ĉeĥov (1860-1904), de kiu jam aperis en Esperanto i.a. la kolektoj *Sveda alumeto* kaj *Ĉeriza ĝardeno*. Jen fakte unu el liaj plej konataj kaj ludataj teatraĵoj, kun diverslandaj filmaj versioj. En malpli ol 50 paĝoj, krom priskriboj de la dekadenca vivo de burĝoj en la neurba Rusujo

kaj la degenero de ties familiaj kunligoj, oni trovas ankaŭ mediton pri la tempopaso kaj la neevitebla kadukiĝo de homoj... tamen ne el la buŝo de Ĉeĥov mem, sed el tiu de la pluraj protagonistoj.

La tradukinto evitis doni informojn pri la nomsistemo de la rusa lingvo, konkrete pri karesnomoj (unu tia estas ĝuste Onklo Vanja). Ĝenetas ankaŭ lia, probable zorge pripensita, decido uzi disfoje la pronomon „ĉi”; kiel aliaj recenzintoj (Gubbins, Johansson) ankaŭ mi ŝatas la ĝeneralan stilon de la traduko, escepte de tiu kulo en la okulo, kies piednota pravigo ne sonas konvinke. Ĉiel ajn, malgraŭ tio kaj la tro simplaj aspektoj kaj redakto, jen sendube majstroverko leginda... kaj ludinda.

**Jorge Camacho**